



Esperanto en Danio

19-a jarkolekto • n-ro 2 • majo 2012

ESPERANTO

125

1887-2012

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Regin Larsen

Ole Therkelsen

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.08.2012

Enhavo

Nova defio: Civitana Iniciato.....	3
Jarraporto de DEA.....	5
Sukcesa interveno en UN.....	13
Androjda Esperanto-radio.....	14
KER ekzamenoj en Kopenhago.....	15
Paperaj gazeteltondaĵoj.....	16
Pri Mogens Groth.....	16
Someraj kursoj en Svedio	17
Kopenhago.....	18
Næstved.....	20
Vojaĝo al Ĉinio.....	21
Plej necese estas	23
Ĉu vi estas legemulo?.....	25
Esperanto plej lerninda.....	27

Nova defio: Civitana Iniciato



Alvenis ebla nova defio por nia movado ĉar de la 1-a de aprilo la Traktato de Lisbono ebligas al la civitanoj de EU prezenti kaj sendi siajn proponojn al la Eŭropa Komisiono.

Eŭropa Esperanto Unio sendis sian proponon (vidu la gazetaran informon) pri la kantado de la eŭropa himno en la neŭtrala lingvo Esperanto laŭ la vortoj de Umberto Broccatelli. La Eŭropa Komisiono havas 2 monatojn por decidi ĉu ĝi akceptos la proponon, do ankoraŭ ne certas kaj ĝis la akcepto ni ne povas komenci voĉdoni.

Kiel Séan O'Riain emfazis dum la interreta diskuto, en la dokumento EEU substrekis “neŭtrala, tut-Eŭropa lingvo”, kaj “kiam civitanoj VOLAS (NE DEVAS) esprimi sian komunan eŭropan identecon”. La plej granda puŝo venis de la prezidanto de la Eŭropa Parlamento kaj iama pola ĉefministro, profesoro Jerzy Buzek, post la kunveno de EEU kun li en januaro 2010.

DEA sendis la gazetaran komunikon al la ĉefaj danaj gazetoj, sed ni ankoraŭ ne rimarkis reagon, kiu verŝajne venos se la iniciato estos akceptita. Momente EEU diskutas kiamaniere plej bone kaj sekure voĉdoni. Ni informos pli detale post kiam ni scios pri la Komisiona pozitiva respondo.

Ileana Schrøder

Gazetara informo

Civita iniciato de Eŭropa Esperanto Unio (EEU)

‘Rekomendo kanti la eŭropan himnon en Esperanto’

EEU hieraŭ utiligis rajton, kiun ebligas la Traktato de Lisbono al civitanoj, prezenti siajn proponojn por pliefikigi la funkciadon de la EU-Traktatoj kaj sendis al la Eŭropa Komisiono por registro sian proponon, ke:

“EU rekomendu la kantadon de la eŭropa himno en la neŭtrala lingvo Esperanto, laŭ la ĉi-kunaj vortoj de Umberto Broccatelli, kiam reprezentantoj de Membroŝtatoj volas kune esprimi sian apartenon al komuna samrajtiga Eŭropo.”

La celoj de tiu ĉiu civitana iniciato estas:

- 1) helpi plifortigi komunan eŭropan identecon harmonie kun naciaj, regionaj kaj aliaj identecoj, kaj tiel pliefikigi EU por civitanoj;
- 2) pligrandigi la partoprenon de la civitanoj en eŭropa integriĝo;
- 3) helpi atingi (1) kaj (2) per vortoj de neŭtrala, tut-eŭropa lingvo por ebligi al civitanoj kanti kune;
- 4) sekurigi la samecon de respekto por ĉiuj eŭropaj lingvoj;
- 5) rekonfirmi kaj reekvilibrigi la du elementojn de la moto de EU, “unuiĝo en diverseco”, por certigi ke oni ne tro substreku diversecon nek maltro unuiĝon.

Inter la 7-membra komitato de subtenantoj loĝantaj en 7 malsamaj EU-landoj estas la Nobelpremiito Profesoro Reinhard Selten el Germanio, kaj la konata politikisto, Marco Pannella el Italio.

La tekston de la tradicia eŭropa himno de EEU oni povas aŭskulti ĉe www.europo.eu/eo/euhropa-himno, kie estas tradukoj al ĉiuj 23 oficialaj lingvoj de EU, al la kroata, kaj al pluraj regionaj, malplimultaj lingvoj kaj mondaj lingvoj (la ĉina, araba, rusa, japana, hindia, bengala, indonezia). Aliaj tradukoj bonvenas.

La Eŭropa Komisiono nun havas 2 monatojn por decidi ĉu ĝi akceptos registri la proponon. Se la Komisiono akceptos ke la propono de EEU fakte helpas la funkciadon de la EU-Traktatoj, kaj ke fari tian proponon estas ene de la povoj de la Komisiono, EEU komencos kun arigado de la 1 miliono da subskriboj en la 27 EU-landoj por ebligi al la Eŭropa Komisiono konsideri tian leĝan proponon. Gravus substreki ke oni povos subskribi rete.

Bruselo, la 2-an de aprilo 2012

Jarraporto de DEA pri la agado dum 2011

La jaro 2011 estis tre rimarkinda pro la okazo de la 96-a UK en Kopenhago. La preparo de la kongreso farita de la LKK komenciĝis jam en 2010, kiam ni eksciis ke la estraro de UEA akceptis la proponon kongresi en Kopenhago, sed kompreneble la laboro intensiviĝis dum la duonjaro antaŭ la komenco de la kongreso. Pluraj LKK-anoj estis ankaŭ engaĝitaj okaze de la ILEI-konferenco kiu okazis dum la semajno antaŭ la UK, kaj pri kiu la ILEI-sekcio raportas. Do, estis granda defio por malgranda grupo de personoj, sed la impreso de LKK kaj de la estraro estas ke ambaŭ bone sukcesis. Bedaŭrinde ni ne ricevis la financon apogon de fondusoj pri kiu ni ege esperis por financi la nacian vesperon kiu estas devo de la landa asocio, sed ni tamen sen troa endanĝerigo de niaj financoj efektivigis belan eventon en Tivoli kiu montris kelkajn aspektojn de la dana kulturo.

La kongreso en Kopenhago estas ankaŭ rimarkinda pro la fakto ke ĝi estas la sola urbo (krom Vieno) kie okazis UK jam la kvaran fojon. En marto ĉi-jare la prezidanto de LKK kaj kelkaj LKK-anoj estis invititaj de la ĉefurbestro de Kopenhago kaj de Wonderful Copenhagen al solena kunveno, kie ili ricevis agnoskan diplomon kiel dankon pro la evento.

Dum la jaro okazis pluraj aliaj aranĝoj kun la kontribuo de nia asocio. Por la dua fojo ni estis invititaj prelegi pri Esperanto en la elementa lernejo Skt. Joseph en Roskilde. Tio okazis la 31-an de aŭgusto, kaj dum kelkaj horoj la lernejoj de la tiel nomata eŭropa klaso spertis plurajn aspektojn de nia lingvo pri kiu ili entuziasmiĝis.

DEA kulaboris kun 5 aliaj neregistaraj organizoj (Center for Konfliktløsning, Rådet for international konfliktløsning, FN-Forbundet, Nordiske Mediatorer, Kvindernes Internationale Liga for Fred) aranĝante diskutkunvenon la 21-an de septembro 2011 pri “la vojoj al paco – ĉu milito estas solvo?”. Pluraj prelegantoj emfazis la bezonon solvi konfliktojn alimaniere ol milite. La diskutkunvenon partoprenis ankaŭ politikistoj kaj ĝi estis anoncita en pluraj gazetoj. Estis nia videbla kontribuo al tiu grava temo.

La 9-an de decembro DEA partoprenis en la Unesko konferenco pri “virinoj kiel portantoj de la evoluo en la globa realeco”, invitate de la Ministerio pri edukado, kie partoprenis la Ĝenerala direktorino de Unesko Irina Bokova. Nia kontribuo al la diskuto estis demando al la direktorino kion Unesko povas fari por defendi la lingvajn rajtojn de la indiĝenaj popoloj kaj la lingvan diversecon.

DEA membriĝis al KUKS. (Kultura Federacio de Eksterlandaj Asocioj), kiu ĉiujare aranĝas festivalon okaze de la datreveno de la fondo de Unuiĝintaj Nacioj, la 24-an de oktobro.



La infana koruso en la adiaŭa solenaĵo de UK

Projekto 125

Projekto 125 estas la projekto por festi la 125-an datrevenon de la apero de la Unua Libro de Esperanto en 1887. UEA decidis en decembro 2011 starigi internacian laborgrupon por kunordigi la preparojn por la jaro, en kiu kompreneble ankaŭ DEA partoprenas. Pri la datreveno DEA elsendis gazetaran komunikon meze de januaro ĉi-jare. Rezulte de tio Jyllands-Posten eldonis la 15-an de januaro artikolon pri la evento kaj kelkajn legantleterojn de niaj membroj kiel reago al la artikolo.

La programo P1 de la dana radio elsendis la 3-an de februaro 50-minutan programon kun profesoro Robert Phillipson, kiu tre klare kaj efike eksplikis pri la avantaĝoj de la internacia lingvo kaj pri lingva politiko. Ankaŭ

Ileana Schrøder partoprenis la elsendon respondante al kelkaj demandoj. Dum la lasta parto de la elsendo ceteraj aŭskultantoj povis interveni. La programo estas tre populara kaj havas multajn aŭskultantojn, do sufiĉe grava atingo por la disvastigo de nia agado. Ni estas informitaj ke ankaŭ la popularscienca revuo *Illustreret Videnskab* planas eldoni artikolon en sia Julia numero.

Informado

La revuo *Esperanto* en Danio aperis 5-foje dum la jaro kaj ni klopodas daŭrigi la eldonadon eĉ se la poŝtelspezoj ĉiujare plialtiĝas kaj indikas ke ni eble estontece devos trovi novan solvon por distribui la revuon. Alia ebleco por informi niajn membrojn ni havas sendante de tempo al tempo nian Novaĵleteron kun urĝaj informoj kiuj ne povas atendi mencion en nia revuo.

DEA partoprenis en la Foiro Krop-Sind-Ånd komence de februaro, kaj la Nordjutlanda klubo partoprenis en marto en Ålborg.

Gazetartikoloj

Raportas Jens Stengaard Larsen

Laŭ infomedia.dk, dum 2011 *Esperanto* estis menciita en danaj gazetoj kaj revuoj 89 fojojn, inkluzive 26 en retaj revuoj – kiel kutime, plejparte la mencioj okazis pli-malpli hazarde. Tio estas sufiĉe neimpona, se oni konsideras ke estis jaro de UK en Kopenhago. Eĉ nur 8 el la artikoloj rekte rilatis al la kongreso, aŭ al la infana kongreseto en Hundested. Kompense, estis nur unu nekrologo – tiu de Mogens Groth.

Loke, Ålborg estis tre sukcesa en marto kun artikoloj en pluraj nordjutlandaj gazetoj. Kelkaj gazetoj en la provinco publikigas erojn el siaj arkivoj, kaj estas iom melankolie konstatita ke antaŭ 75 jaroj povis ekesti klubo en tiel malgranda urbo kiel Ringkøbing. Kuraĝige estas tamen ke eksterlandaj okazaĵoj povas konduki al mencioj de *Esperanto* en danaj gazetoj, kaj ili ĉiam ligiĝas al io pozitiva, ekzemple la sukcesa brazila filmo “Matraga”, kiu prenas inspiron de aŭtoro kiu estis esperantisto; traduko en la danan de la memoroj de Carlo Nicolodi, filo de latva-itala esperantista paro; kaj la 80-jariĝo de William Shatner, kiu rolis en la (fi)fama *Incubus*. Ankaŭ artikoloj pri *Vikipedio* ofte mencias ke ĝi havas *Esperanto*-version.

LibroServo

Raportas Arne Casper

La LibroSevo de DEA spertis malfortan vendadon en 2011 pro la Universala Kongreso – estas tute nature ke oni atendis ĝis la kongreso, ĉar la sortimento de la Libroservo de UEA estas multe pli granda ol nia. Tamen ni precipe sukcese daŭrigas la vendadon de la lernolibro de Stano Marček kaj de la vortaro.

Alia ĝena afero estas la maltaŭga AVI por libroj – 25% kompare kun ekzemple 6% en Nederlando (kaj Svedio) – tio certe ne igas la librojn malmultekostaj.

Ĉefdelegita laboro

Raportas Arne Casper

Koncerne la ĉefdelegitan laboron iugrada kresko de membroj estis atendebla – kaj vere ni atingis pli ol 100 individuajn membrojn en 2011. Revuo Esperanto indikas en la ĉi-jara aprila numero 103, sed fakte ni atingis 108 membrojn, ĉar la nove aliĝintaj membroj kalkulas je rabata aliĝo al la kongreso.

Bedaŭrinde la nombro de membroj certe malplialtiĝos en 2012 – ni esperu nur ke eventuala malplimultiĝo estos limigita kaj ke nia kresko ne estis kaŭzita pro tiel nomataj ‘kongres-aliĝaj membroj’. Bedaŭrinde, ĉar UEA ege bezonas plialtigon de sia membraro.

ILEI

Raportas Bent Jensenius

La granda defio de nia sekcio en 2011 estis aranĝi la 44-an Konferencon de ILEI kiu okazis la 17-23 de julio. La konferenco tre bone sukcesis kun la ĝisnuna plej granda nombro de konferencanoj, nome 103 partoprenantoj el 35 landoj. Fine de la konferenco, la 23-24 de julio okazis simpozio pri lingvoj de scienca komunikado kaj edukado. La konferenco kaj la simpozio okazis en la Humanistika Fakultato de la Universitato de Kopenhago kun la temo “Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado”. La estraro de la dana sekcio kune kun pluraj membroj fondis la LKK de la konferenco jam en 2010, kiam ILEI komunikis al nia sekcio la informon ke la konferenco okazos en Kopenhago.

Antaŭ la konferenco, en junio, grupo de 7 profesoroj de la Ĉina Komu-

nikada Universitato vizitis la Universitaton de Kopenhago por kunlabora kontakto inter la du universitatoj, danke al Yu Jinchao, instruistino de la Ĉina Universitato, kiu informis ilin pri la ILEI-konferenco

Ceteraj agadoj de la sekcio

Dum 2011 la sekcio aranĝis kurson por komencantoj kun partopreno de 5 personoj kaj kurson por daŭrigantoj kun partopreno de 10 personoj.

Okazis la dua eldono de la vortaro Dana-Esperanto kies unua eldono rapide elĉerpiĝis en 2010. Same la lernolibro de Stano Marček – rekta metodo, tre rapide elĉerpiĝis kaj nia Libroservo aĉetis novan stokon de la dua eldono.

Ni daŭre instigas niajn membrojn partopreni en internaciaj kursoj kaj ekzamenoj, kaj unu dana membro partoprenis la kurson kiu okazis dum unu monato en Ĉinio ĉi-vintre.

En 2011 la sekcio nombris 16 membrojn.

Okaze de la projekto 125 la sekcio kunlaboras kun DEA pri la KER-ekzamenoj en Kopenhago la 9a de junio 2012, al kiu aliĝis 8 personoj.

DEJO

La membroj de DEJO denove partoprenis en la Festivalo de Roskilde kune kun multaj aliaj esperantistaj junuloj.

Jarraportoj de la Klubo

Konversacia Esperanto-Klubo, Kopenhago

Raportas Betty Chatterjee

Ne necesas mencii, ke la jaro 2011 estis eventoplena jaro por la membroj de KEK. Unue mi volus prezenti al vi la faktojn pri la dumjara agado de la klubo.

Ni klubkunvenis 37 fojojn, kaj la programo inkludis:

- 12 prelegojn, inkluzive 1 danlingvan.
- 9 konversaciajn rondojn pri multaj diversaj temoj.
- 1 aŭkcion.
- Skajpo-konferencan vesperon kunlabore kun la Esperanto-klubo en Oslo.

- 6 studgrupojn dum kiuj ni legis Marvirinstraton.
- kvizvesperon.
- Esperanto-doman vesperon.
- DEA-vesperon.
- 3 junularajn vesperojn.
- Ekskurson al Kristiano.
- Informan vesperon pri ekzamenoj eŭropaj
- Partoprenon en la 2-taga aranĝo Internaciaj Tagoj de la kopenhaga komunumo.

Detalaj informoj pri la aranĝoj legeblas en la numeroj de Ponto kaj Esperanto en Danio de 2011.

Aliaj menciendaj faktoj estas:

La membraro maljuniĝas kaj malkreskas; en la jaro 2008 KEK havis 72 membrojn kaj en la jaro 2011 nur 60. Du trionoj el la nuntempaj membroj estas pensiuloj.

Averaĝe la ĉeestantaro dum klubaj kunvenoj estas inter 10 kaj 15.

Ni malofte krokodilas, kaj mi aŭdacas diri, ke iom post iom nia lingvo-nivelo plialtiĝas.

La temo de la ĉi-jara Universala Kongreso, ‘Dialogo kaj reciproka kompreno’, rilatas al intergeneracia kunlaborado. Endis menci la faktojn, ĉar se ne venos pli da membroj, ĉu la klubo baldaŭ malaperos? Pro tio la estraro de KEK enkondukis novajn iniciatojn kaj daŭre flegis malnovajn. Ek de la aŭtuno Mathias Dalmoŝ jam akceptas la respondecon por la lasta kunveno de la monato. Ni nomas la vesperojn ‘junularaj vesperoj’; tamen oni bonvenigas ĉiujn senkonsidere de aĝo. Ĝis nun okazis tri kunvenoj kiuj temis pri arto, Esperanto-retradio kaj la historio de la junulara domo. Ni ĝuis la prelegojn kaj antaŭĝojas la venontjarajn junularajn eventojn.

Esperanto-Unuiĝo de Næstved

Raportas Grete Nielsen

2011 estis la jaro de la 96-a UK, kiu okazis en Kopenhago. En tiu partoprenis ankaŭ pluraj membroj de la klubo en Næstved, kiuj tiel sukcesis renkonti gesamideanojn de multaj landoj.

Kiel dum la pasintaj jaroj nia programo enhavis danlingvajn prelegojn, nome printempe Lene kaj Jan Niemann pri Feroaj Insuloj kaj Torben

Petersen pri sia tempo kiel militista pastro en Afganio. Aŭtune du prelegoj pri respektive internacia artekspozicio por handikapitoj (Hernán González) kaj artlernejo por handikapitoj (Lene Nielsen). La lokaj medioj kiel antaŭe reklamis por ĉio, kvankam ni ne aĉetas anoncojn, sed en la programkajero de la nomita artekspozicio Esperanto rolis inter la aliaj lingvoj.

En aŭgusto ni per trajno vizitis Odense, kie Liss-Lotte Talbro akceptis kaj gvidis nin al la Fuena Vilaĝo. La urbo estis eksterordinare bela pro la jara florfestivalo – tiun ni ĝuis, antaŭ ol Liss-Lotte regalis nin per vespermanĝo.

La studado de *Faktoj kaj Fantazioj* daŭris dum mardoj de la komenco de 2011, ĉar pli konvene al pluraj, kaj post la someraj ferioj ankaŭ la vesperaj danlingvaj prelegoj okazas dum mardoj. Tio estas eble la kaŭzo, ke venis malpli da aŭskultantoj ‘de la urbo’ ol antaŭe. Mardo estas populara kunventago de multaj asocioj.

En oktobro estis sukcesplena kultura vespero en la urbo, sed ni ne kapablis trovi taŭgan kaj allogan programpunkton.

Ĉu vi memoras la jubilean marŝon en 1987? Restis pluraj belaj medaloj faritaj tiuokaze; 25 el ili ni donacis al Libro-Servo de la UK.

Dum la sezono ni havis 14 diversajn aranĝojn kun meza nombro de partoprenintoj je 9. La membronombro por 2011 estas 24, kaj la *Novaĵletero* aperis dufoje.

DEFA daŭre okazigas kunvenojn en nia klubejo dum la vintra sezono.

Århus Esperanto-klubo

Raportas Stanislaw Mielczarek

La jaro 2011 ne estis tro favora por nia klubo. Mortis 2 el niaj multjaraj membroj, nome: Bodil Robinson (88-jara), Risskov kaj Egon Bak (85-jara), Kolding. Inna Busck el Hobro transloĝiĝis al Kopenhago. Do, nun Esperanto-klubo de Århus nombras 24 membrojn, 3 membrojn malpli ol pasintjare.

Koncerne nian kunvenejon la situacio estas tia, ke la Komunumo de Aarhus decidis translokigi Langenæs Handicapcenter kaj Senior-Centret jam post la somero en la konstruaĵon de la antaŭa Urba Muzeo ĉe Carl Blochs Gade. La Urba Muzeo havas novan sidejon en la Malnova Urbo. Oni atendas, ke la Urba Konsilantaro de Aarhus baldaŭ decidus pri la aĉeto

de la konstruaĵo de la malnova muzeo. Post la adaptado de la konstruaĵo por handikapuloj kaj pliaĝuloj ni havos novan kunvenejon ĉe Carl Blochs Gade 28. Por la kunvenejo ĉe Østergade ni pagis 50 kronojn jare (!). La lupagon por la nova kunvenejo ni ankoraŭ ne konas, sed verŝajne ĝi estos pli alta. Ni esperu, ke ni ne bankrotos.

La partoprenado en la kunvenoj – bedaŭrinde – ne estis tro impona. La malnombriĝo de la klubo kaj la disa loĝado de la klubanoj kaŭzis nuligon de kelkaj kunvenoj.

La celo de la somera ekskurso 2011 estis Skandinavisk Dyrepark en Kolind. Ni povis vidi ursojn, vulpojn, cervojn, alkojn, boacojn kaj multajn aliajn bestojn kaj birdojn. La vetero ne estis tro bona, sed tamen 11 partoprenantoj ĝuis la restadon tie.

Dankon al vi ĉiuj por bona kunlaboro en la 2011-a jaro kaj ni esperu, ke la kuranta jaro estos bona!

Nordjutlanda Esperanto Klubo, Aalborg

Raportas Ejnar Hjorth

En 2011 ni estis 21 membroj, el ili 6 estas subtenantoj. Do estas minuso de 5 membroj, kompare de la pasinta jaro. Mi skribis al la nepagintoj por memori ilin pri la membreco, sed ne ĉiuj pagis.

Ni havis du kursojn en Aalborg kaj unu en Hobro.

Amikoj el Bulgario kaj Japanio vizitis nin dum la somero. Kiel helpo al la vojaĝkosto por la amikoj el Bulgario, nia klubo pagis 4.350,00 kr.

Instruisto en lernejo de Nørresundby deziris informi pri Esperanto al la lernantoj. Mi helpis kaj donis al li informmaterialon. La televido faris elsendon pri tio kaj pri nia kluba kurso.

Ni havis budon en ekspozicio en Aalborgshallen.

Mi metis broŝurojn en Studenterhuset kaj en AUC, la Universitato de Aalborg.

Kalkulado: La jara rezulto estis minuso de 5.383,00. En nia banko estas 5.852,75 kr. La kotizoj restas la samaj en 2012, nome 200,- kr. por unu membro, 300,- kr. por samloĝantoj, 80,- kr. por junuloj ĝis la 26-a jaro kaj 50,- kr. por membroj kiuj deziras subteni la klubon kaj esperanton.

Atentu!

En 1970 la filmisto Erik Elias, la edzo de Birthe Trærup, faris filmon dum la Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Vieno. Ni serĉas la originalon, kiu troviĝis ĉe Birthe Trærup. Se iu pruntis de ŝi tiun filmon aŭ scias, kie ĝi nun troviĝas, bonvolu esti tiel afabla informi nin. Dankon.

Birthe Lapenna

28 19 22 56

lapenna@mail.dk

Sukcesa interveno en UN

La fina deklaro de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj, kiun la Departemento pri Publika Informado de Unuiĝintaj Nacioj okazigis en Bonn en septembro pasintjare, fariĝis oficiala dokumento de la Ĝenerala Asembleo de UN. Ĝi estis tradukita al ĉiuj oficialaj lingvoj de UN kaj en la 20-a de marto registrita en la aktoj de la Ĝenerala Asembleo.

La fina deklaro estas aparte celita por la UN-konferenco pri daŭripova evoluo, Rio+20, kiu okazos en Rio-de-Ĵaneiro de la 20-a ĝis la 22-a de junio. La deklaro enhavas multajn rekomendojn, kiuj estu konsiderataj tie. En la Bonna konferenco la reprezentantoj de UEA sukcesis akceptigi plurajn erojn en la fina deklaro, kies unua versio diris nenion pri la lingva dimensio de daŭripova evoluo. Eĉ la nura vorto “lingvo” ne estis menciita en la unua versio, sed dank’ al la delegitaro de UEA la graveco de lingvoj kaj lingva diverseco estas menciita plurfoje en la fina versio. Fundamente gravaj estas ĝia konstato, ke “biodiverseco kaj lingva diverseco estas nedisigeblaj, konektitaj kaj interdependaj”, kaj la sekva alineo:

“Ni alvokas por respekto al kaj inkluzivado de etnaj lingvoj en la eduka sistemo, ĉar tiaj lingvoj entenas la kompleksecon de siaj respektivaj medioj, kaj ankaŭ por konsidero de la potencialo de neŭtrala internacia lingvo kombinanta klarecon kaj facilecon de lernado kun sia neŭtraleco, kaj tiel povanta esti rigardata kiel esence daŭripova.”

Androjda Esperanto-radio

Pli kaj pli da homoj havas uzas la plurfunkciajn telefonojn kaj tabulkomputilojn kiuj funkcias per la operacia sistemo androjdo (Android).

Kiel donaco por la Esperanto-movado aperis senpaga aplikaĵo “Esperanto-radio Muzaiko” por androjdaĵaj aparatoj, kiu ebligas aŭskultadon de pli ol 10 Esperantaj radio-kanaloj.

La programo estas senpage elŝutebla el la Androjda Merkato. Serĉu per la vorto: “Muzaiko”, skanu la kodon ĉi-apudan aŭ retumu al:

<https://market.android.com/details?id=dk.nordfalk.esperanto.radio> .

Post starto de la programo ĝi tuj sonigas la 24-horan radiostacion “Muzaiko”.

Krome ĝi ofertas elekton el pli ol 10-kanala sortimento de Esperanto-radiopodkasto.



Per la programo oni povas ne nur elekti inter la diversaj podkasto de tiuj radio-kanaloj, sed ĝi aperigas ankaŭ la hejmpaĝojn de ili, kaj donas eblon por tuja kontaktado de redakcioj.

Por ĉiu kanalo estas malsupre galerio, kie eblas per la fingro esplori la malnovajn elsendojn kaj podkastojn.

Krome eblas, per premo de la fizika MENU-butono de la telefono kundividi la podkaston kun amikoj kaj kontakti la redakcion de la kanalo.

La androjda radioprogramo multe simpligas la aŭskultadon de Esperantaj radioelsendoj; la telefono estas ĉiam ĉemane kaj sufiĉas nur premo de butono por ekaŭskulti Esperanto-radion.

La programo elŝutas la sonon tra la interreto, pro tio rekomendindas esti konektita al sendrata reto aŭ havi datum-abonon, se oni volas ofte aŭskulti Esperanto-radion.

Survoje, sed ankoraŭ ne publikigita, estas pluraj novaj funkcioj. Interalie oni povos uzi la Esperanto-radion kiel vekhorloĝon, por vekigi per agrabla muziko en Esperanto.

Se vi havas proponojn por plibonigo de la programo vi estas bonvena kontakti la aŭtoron, Jacob Nordfalk, ĉe

jacob.nordfalk@gmail.com



KER ekzamenoj en Kopenhago

Por la unua fojo oni povos fari skriban ekzamenon en Kopenhago okaze de la projekto 125. Ĝi okazos la 9-an de junio kaj la partoprenantoj devas esti surloke je la 10-a horo en Tomsgårdsvej 35. La ekzameno havas 3 nivelojn kaj la longodaŭro de la ekzameno estas jene:

B1: 09.10 – 11.10

B2: 09.10 – 12.10

C1: 09.10 – 13.10

Ĝis hodiaŭ, la 1-an de majo, aliĝis jam 316 personoj en trideko da urboj en 17 landoj, inter ili en Kopenhago aliĝis 8 personoj. Entute tre bona sukceso.

Oni povas aliĝi **ĝis la 15-a de majo**, do estas ankoraŭ tempo por aliĝi. Prenu tiun unikan ŝancon kaj testu vian kapablon! La plimujlton de la informoj oni trovas en la paĝo <http://edukado.net/ekzamenoj/ker/tutmonda>.

Ileana Schrøder

Paperaj gazeteltondaĵoj

- Feb 2012: Jernbanefritid: En DEFA-opgave
05.02. Jyllands-Posten: Marie Schrøder menciita en artikolo pri Assistens Kirkegård
07.02. Ugebladet Næstved: Asocia registro
07.02. Kalundborg Folkeblad: Nissemor taler esperanto (Anna Hansen)
07.02. Ugebladet Vestsjælland: Nissemor fra Risbjerg fylder rundt
16.02. Information: Esperanto er samhørighed (artikolo de Jørgen Manniche, Helsingør)
28.02. Ugebladet Næstved: Prelego pri Laoso far Lene kaj Jan Niemann
29.02. Berlingske Debat “Groft sagt”: Verdensuniversitetet
06.03. Sjællandske Næstved: Prelego pri Laoso
Mar 2012: Jernbanefritid: Hvorfor esperanto – i hvert fald på længere sigt?
Mar 2012: Sprog & Samfund: Lidt om sprogmelodi (negative pri Eo)
25.03. Jens Stengaard Larsen respondas al tiu artikolo
- Daŭre sendu ĉiajn menciojn pri Esperanto al Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.

Pri Mogens Groth

Mogens Groth Jørgensen estis unu el la esperantistoj danaj, kiujn mi neniam persone konis, kvankam en 2005 mi unu fojon parolis kun li telefone. Li tiam invitis min iam viziti lin, tamen pro diversaj kialoj la iamo iĝis neniamo; la kulpo estis la mia. Legante Memoran Kajeron verkita kaj dane kaj Esperante de Mogens Rude Andersen, Helle Eble Cleary kaj Lene Niemann, mi ekkonsciis kaj mi ege bedaŭris tiun perditan ŝancon.

Mogens Groth Jørgensen 27.10.1913 – 24.12.2010 hazarde eklernis Esperanton en la jaro 1942 post la partopreno en Zamenhofa festo, kie li konatiĝis interalie kun Poul Thorsen. Pri tiu oni signife skribas en la kajero, ke li ‘iĝis esperantisto jam tiam antaŭ ol lerni’. ‘Signife’, laŭ mi, ĉar

legante pri la eventoplena vivo kaj la altruismaj sintenoj de Mogens Groth, oni impresiĝas pri lia homeco. Kiel eminenta esperantisto li multe kontribuis al Esperantujo per instruado, tradukado kaj gastigado de danaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Krom tio li sciis multon pri la historio de la dana movado, kaj aktive kontribuis al la revuo 'Norda Prismo'.

Fake li multe spertis; li laboris kiel bakista lernanto, bienisto, koĉero, fotisto, sed precipe kiel muzikisto. Sintene li estis socialisto, pacifisto kaj dum la 2-a mondmilito li estis rezistanto. Tamen la kontribuantoj danaj kaj eksterlandanaj ĉefe memoras lin kiel vera kaj fidela amiko.

La enhavo de la 32-paĝa kajero ilustrata povus interesi ne nur esperantistojn, sed ankaŭ aliajn personojn, ekzemple iujn kiuj volus informiĝi pri la spertoj de rezistantoj dum la dua mondmilito. Se vi ŝatus ekhavi la memorkajeron, kiu estis financita kaj eldonita de la Dana Esperantista Fervoja Asocio, ĝi estas aĉetebla kontraŭ 15 danaj kronoj + afranko. Surklaku jene por la kontaktinformoj: <http://www.jernbaneesperanto.dk/>

Betty Chatterjee

Someraj kursoj en Svedio

Venu studi Esperanton en la konata Esperanto-Gastigejo – en Lesjöfors, trankvila vilaĝo ĉirkaŭita de arbaroj kaj lagoj, meze inter Stokholmo kaj Oslo. De la 8a ĝis la 15a de julio 2012 okazos multo tie:

- kursoj trinivelaj: komencanta, daŭriga kaj konversacia
- infana ludgrupo ekde kvin jaroj
- temstuda grupo: alternativaj sanigaj metodoj kaj vivmedio
- praktika kuireja laboro – por lerni kuirejajn terminojn
- ekskurso al lokaj kulturejoj

Kiel kursano vi rajtas inviti viajn familianojn aŭ amikojn veni turismi en la bela regiono Värmland dum la semajno antaŭ aŭ post la kursoj kaj tranokti kun 50%-rabato.

Por ricevi kompletan informleteron kun ĉiuj prezoj (la kursoj mem estas senpagaj), skribu al <egarden@esperanto.se>.

Kopenhago

La kunvenoj de KEK komenciĝas je la 19-a kaj finiĝas je la 21-a. La adreso estas: Tomsgårdsvej 35, 2400 København NV. Cetero la kluba programo legeblas ĉe la Facebook-grupo 'Amikoj de la Kopenhaga Esperantisto-klubo'. La kluba kontaktulo estas la prezidanto:

Betty Chatterjee +45 38 89 10 13 chatterjeebetty@hotmail.com

Printempa programo

La 14-an de majo. Esperanto-Doma vespero.

La 21-an de majo Junulara Vespero. Temo anoncota.

La 23-an de majo. Pikniko en Ĝardeno de la Reĝo kaj boatekskurso per Netto-boato.

La 28-an de majo Pentekosto.

La 4-an de junio. Prelego 'Nia vojaĝo al Usono – lando de kontrastoj.' La preleganto estas la prezidanto de la klubo de Arhuso, Stanislaw Mielczarek.

La 11-an de junio. Amir prelegos 'Cifereca kaj reta identeco de individuoj'.

Dimanĉon la 17-an de junio. Zita Garbaravicienė estas spertulino pri manĝindaj fiherboj (ekzemple urtikoj). Tial ŝi pretos gvidi ekskurson ien, kie ni povos rikolti ilin. Post kiam ni revenu al la kulturdomo, kie ni kunkune preparos bongustan kaj sanigan manĝaĵon. Informoj pri la horo kaj la loko sekvos.

Dum julio la kulturdomo estas fermita.

Aŭtuna Programo

La 13-an de aŭgusto: La aŭtuna sezono de la klubo komenciĝos per komuna parolado pri someraj travivaĵoj kaj okazaĵoj en Esperantujo. Jytte Sunekær jam promesis, ke ŝi rakontu pri siaj impresoj de la Universala Kongreso en Hanojo.

La 20-an de aŭgusto: Ana Røssum respondecos pri la programo. Sekvos informoj pri ties enhavo.

La 27-an de aŭgusto: Junulara vespero. Mathias Dalmoose respondecos. Sekvos informoj pri la enhavo.

La 3-an de septembro: Pri la nova Esperanto-urbo en Sicilio – Mazaradervalo. Betty Chatterjee kaj Eŭgeniusz Rybarczyk, kiuj partoprenos

la 79-an italan kongreson, rakontos pri propraj impresoj.

<http://kongreso.esperanto.it/79/indice.php?lingvo=eo>

La 10-an de septembro: Studgrupa vespero. Finn Østerbæk. Li trovos jam nelegitan fablon de 'Marvirinstrato'. Informoj sekvos.

La 17-an de septembro: Distra vespero. Ne nur infanoj lernas per ludado. Venu ludi kaj distriĝi.

Vendrede la 21-an de septembro: Taga ekskurso al la subĉiela muzeo. Informoj sekvos.

La 24-an de septembro: Junulara vespero. Mathias Dalmoose respondecos. Informoj sekvos.

Ŝanĝoj povos okazi, tial informiĝu per www.esperanto.dk aŭ la semajna novaĵilo de KEK.

Impresoj pri junularaj vesperoj.

Ek de la pasinta aŭtuno la lasta kunveno de la monato jam estas 'junulara vespero'. Feliĉe estas, ke ankaŭ maljunuloj estas bonvenaj, kaj ni la gegrizharuloj ĉiam ĝuas la kunvenojn, kies temoj estis tre diversaj: interalie pri arto, historio junulara, Esperanta radio, fiziko kaj laste pri Esperantaj programetoj por multkapablaj telefonoj.

La 30-an de aprilo Regin Larsen kaj Jacob Nordfalk venis en la klubon por rakonti pri la ebloj kaj la uzadoj de inteligentaj telefonoj. El la dudeko da partoprenantoj en la kunveno, proksimume kvarono el ili ankoraŭ posedas ian specon de multkapabla telefono. Kelkaj posedas androjdajn aliajn posedas I-telefonon; Jacob prezentis al ni la avantaĝojn de Androjdo kaj Regin priparolis la avantaĝojn de I-telefono.



Mi posedas androjdajn telefonon, kaj hodiaŭ mi elŝutis kaj sukcese uzis Esperantan klavaron per kiu mi povis skribi la supersignojn. Nun mi antaŭĝojas gustumi la programojn per kiuj mi povas aŭskulti Esperanto-radion kaj konsulti la Danan-Esperantan vortaron ktp.

Mankas al mi la tempo longe verki pri la junularaj vesperoj, ĉar hodiaŭ estas la limdato por kontribuoj al Esperanto en Danio. Tamen mi volus esprimi mian grandan dankon al Mathias Dalmose kaj al ĉiuj, kiuj jam kontribuis ‘vitaminajn injektojn’ dum la junularaj vesperoj.

Betty Chatterjee

Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tel 55 72 12 40, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk. – Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111. Pri komenĉoroj bonvolu vidi ĉe la koncernaj datoj.

Okazos:

Ni planas ekskurson **mardon la 12an de junio** al Holmegård Park, kiu estas areo kun eblecoj por travivaĵoj diversspecaj. La ‘parko’ estas parto de la iama *Holmegård Glasværk*. Ni planas foriron de la stacidomo de Næstved je h 13.23 per aŭtobuso n-ro 602, alveno en Holmegård je h 13.41. La enirprezo estas po 59 kr kaj kelkaj aktivecoj kostas ekstre. Ni planas komune manĝi proksimume je h 17.30 je prezo de po 99 kr (temas pri rostita viandlardo: *stegt flæsk ad libitum*). Aliĝo estas necesa, plej malfrue 05.06. al Grete, tel 5572 1240.

Ni ankaŭ pripensas iun aranĝon sabate la 4an de aŭgusto, ĉar tiam estos la 35-jara datreveno de nia unuiĝo, sed pri tio poste.

Okazis:

La studgrupo diligente laboris unu fojon monate, kaj 07.02. ni eĉ aranĝis komunan manĝon kun posta rakonto pri travivaĵoj dum la UK en Kopenhago.

06.03. Lene kaj Jan Niemann rakontis pri siaj travivaĵoj en Laoso kaj Vjetnamio. Tio supozeble estis la lasta el niaj danlingvaj prelegoj, kiujn ni provis reklami al pli vasta publiko (cetere kun varia sukceso). En la pasintaj 14 jaroj ili sumiĝas je 72 tre diversspecaj prelegoj.

10.04. Sezonfina aranĝo kun surprize multaj partoprenantoj kaj kun magra programo.

Vojaĝo al Ĉinio



Mi unuafoje aŭdis pri tutmonata kurso de Esperanto en Ĉinio dum kunveno de KEK. Betty informis pri pluraj kursoj kaj kunvenoj en la Esperanto movado, kaj ŝajnis al mi ke jen la kurso kiun mi bezonas. Jam kelkajn jarojn mi partoprenis diversajn Esperantokursojn, sed miapopinie mi ne kontentige progresis, kvankam mi havis tre bonajn instruistojn. Dum la venonta monato mi pensis pri la kurso, kaj esploris pri mia laboro, kaj kiam mi malkovris ke mi ne havos laboron dum la periodo de la kurso, mi rapide aliĝis.

La prezo de la kurso entute inkluzive vojaĝon, hotelon, manĝaĵon estis inter 12.000 kaj 13.000 danaj kronoj, kio laŭ mi estas malmultekosta por tutmonata kurso. La kurso situis en la insulo Hajnano en la plej suda parto de Ĉinio, en la tropika regiono.

Du tagojn antaŭ la kurso mi alvenis, kaj havis bonan tempon saluti aliajn partoprenantojn el ekzemple Usono, Francio, Japanio, Koreio, Mongolio, Italio kaj Kanado, entute estis partoprenantoj el 22 landoj. El Ĉinio estis 68 kaj aliaj eksterlandanoj estis 63, totale do 131 homoj.

Dennis Keefe el Usono kreis la kurson en Hajnano, kiun li antaŭ tri jaroj nomigis “La Esperanto Insulo”. Li nuntempe loĝas en Ĉinio kaj instruas la anglan lingvon ĉe universitato tie. Li antaŭe faris la BEK-instrusistemon, kiu estas tre konata en Hispanio kaj Francio. Li gvidis la tutan kurson kaj instruis la komencantojn.

La profesoroj Ron Glossop el Usono kaj Frederico Gobbo el Italio instruis kurson “La Universitato de Esperanto”, kaj Katalin Kováts el Belgio

instruis Metodikon de Pedagogio. Ambaŭ kursoj estis por spertaj esperantistoj.

Estante en Ĉinio ni loĝis, manĝis kaj studis laŭ Ĉina maniero. Vespermanĝo en restoracioj kostis inter 8 kaj 15 danaj kronoj, kaj la hotelo tute ne estis komforta. La litoj estis malmolaj kiel ligno, nur luksaj hoteloj havas molajn litojn, kaj plurfoje ni ne havis varman akvon por duŝi, ĉar ili uzas sunajn hejtilojn kaj estis periodoj kun malbona vetero. Mi vidis la programon por la venonta jaro, kaj tie mi legis ke en la estonteco ili uzos pli bonajn hotelojn.

La instruado estis, kiel mi antaŭe skribis, dividita en du grupojn. La komencantoj estis po 50-60 lernantoj en unu klasĉambro kaj sekvis la BEK-kurson de Dennis Keefe. Li kreis la tiun kurson kiam li instruis Esperanton en Hispanio antaŭ multaj jaroj. Mi povas rekomendi la kurson per kiu oni povas lerni fari simplan konversacion post unu monato. Se la lernantoj post la kurso progresos pri legado, aŭdado kaj parolado en Esperanto, ili tiam povas partopreni en kunvenoj kaj kongresoj. Plejparte la komencantoj estis ĉinaj studentoj kiuj lernis fari simplan konversacion dum la kurso. La studado daŭris ĉiutage inter la 8-a horo matene kaj la 6-a horo vespere kun 2-hora paŭzo posttagmeze – dum 6 tagoj semajne. Dume okazis la Ĉina novjara festo kun kvar libertagoj, dum kiuj ni ekskursis al la suda parto de la insulo.

Por mi estis tre interese resti kun homoj el Azio dum longa tempo. Antaŭ kvin jaroj mi vizitis Ĉinion kaj tiam mi ekkonis la turistan parton de Ĉinio.



Dum la kurso mi ekkonis la pli profundan parton de la ĉinaj homoj kaj kulturo kiuj estis tre interesaj al mi. Kompreneble mi ricevis multajn novajn amikojn el la tuta mondo, kaj mi estas certa ke mi denove renkontos plurajn el ili – ie. Mi estas tre kontenta pri la kurso, mi nuntempe povas paroli pli libere, kaj mi planas reveni denove venontjare. Ĉu vi min akompanos?

Peter Wraae

Plej necese estas ...

... koni la ĝustan tempon agi



Estante komercisto, pri reklamado mi ja scias, sed pri reklamo de Esperanto mi bezonis investi tempon kaj monon. Mia unua sperto estis en 2002 en Danio kaj sekvis Belgio, Francio, Germanio, Italio, ktp; entute 13 landoj. Ĉiam, ion novan mi lernis survoje: pli altiras konkretaĵoj, necesas laboro de grafikisto kaj reklamisto, taŭgas mallongaj tekstoj, ktp.

Mia celo estas vekigi la amaskomunikilojn, ĉar sen ili ni ne povas esperi pri la fina venko. Konsekvenco de tio estos la konkero de la popolo, kiu siaflanke influos la politikistojn.

Post 9-foja reklamado en *Le Monde*, en junio 2010 mi negocis la aperigon de novaĵo pri lingva malegaleco. Tamen ilia reprezentanto, S-ro Meixner, diris, ke intereso ne estis. Mi, do, planis prelegvojaĝon al 9 francaj urboj por varbi reagantojn al la Zamenhof-taga tutpaĝa anonco.

Post prelego en Parizo mi veturis al Vannes, kie mi subite malsaniĝis. Mi telefonis al mia edzino: “Mi revenos, ĉar mi ne povas spiri”. Ŝi respondis: Esperanto-Movado estas pli grava ol via vivo, do daŭrigu. Sed mi ne povis teni min kaj kiam mi alvenis Osakon, ne povis moviĝi.

La publiko serioze kaj sincere aŭskultis. Post apero de la reklamo, mi ricevis centon da leterkopioj al *Le Monde*; verŝajne ĝi ricevis pluroble pli ol mi. Al la publika intereso, ilia respondo estis ignorado. Mi sentis, ke mi staras antaŭ giganta kaj fortika muro pro desupra premo kaj ke ili estas monavidaj... sed ‘dissaltos la obstinaj baroj per la sankta amo disbatitaj’.

Kio estas la rezultoj de la agado en ĉi tiu jardeko? Inter la negativaĵoj menciendas, ke en la komenco la reklamado ne sufiĉe profesiis: ne persvada enhavo, tro da tekstoj, ne konkretaj informoj, ne taŭga aspektigo. Plie, mi nur 1-foje reklamis en 1 lando... ja ripetado estas esenca.

Kiam aperis la anonco en *Rzeczpospolita* en 2004, okazis lunĉodebato en Varsovio kun la litovaj kaj polaj EU-parlamentanoj. Tiam Bronisław Geremek, EU-vicprezidanto kaj eksa ministro pri eksterlandaj aferoj en Pollando, rifuzis ĉeesti kaj private renkonti min, ĉar li konvinkiĝis, ke Esperanto ne povus venki. Tamen en majo 2008 mi sukcesis tuŝi lian koron

per anonco en 'Le Monde'. Tiam EU rifuzis utiligi la polan en sia retejo kaj post kunveno kun Seán Ó Riain kaj Jozef Reinvart li kunorganizis la debaton 'Esperanto, ĉu amiko aŭ malamiko de multlingvismo?' por ĉiuj parlamentanoj la 14-an de julio. Tragike li mortis aŭtakcidente survoje al Bruselo. Li estis konvinkita, ke plejparto el la EU-parlamentanoj kontraŭas la anglan dominadon kaj ke estas granda manko de scioj kaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto. De liaj observoj ni profitu!

La anoncoj vekis homojn kiel Isabel Castro, direktoro de Eurimages aŭ la urbestron de St-Aignan de Grand Lieu, kiuj montris intereson pri la lingvo kaj la Movado. Post aperigo en La Repubblica en 2003, 8 italaj parlamentanoj promesis al Itala Esperanto-Federacio proponi la utiligon de Esperanto en la Eŭropa Komisiono. Unu el ili, Emerenzio Barbieri, dum la nuna parlamenta mandato prezentis leĝproponon pri nia lingvo.

Ĉu ankoraŭ menci, ke la hejmpaĝoj de la landaj asocioj en la anonclandoj estis pli vizitataj sekve de la reklamoj? Aŭ ke pliaj lernantoj aperis en la kursoj? La slovaka diplomato Josef Reinvart sendis kopiojn de la aperaĵo en SME en 2004 al ĉiuj slovakaj ambasadejoj tra la mondo kaj oficistoj de la ministerio pri eksterlandaj aferoj.

Ĉu reklami estas vana elspezo? Certe ne, sed investo en la estonteco, ĉar se EU agnoskos Esperanton, la mondo tuj sekvos.

Esperanto estas varo same kiel Coca-Cola, McDonald's, ktp. Se ni ripete montras la solvon al la nuna lingva malegaleco, ni havos la ŝancon sukcesi, ekzemple per samtaga reklamado dum unu jaro ĉiumonate en la 27 EU-landoj. Nun oni simple cedas antaŭ la ĝeneraliĝo de la angla. Nia misio estas vekti la homaron de tiom vasta toporo, imitante Ludovikon. Mi pensas, ke tia sen 'precedenca agado povus utili kiel brulŝnuro. Ni ne perdos ĉion. Certe io sekvos. Ni bezonas investi por sukcesi. Ĉiu organizo kaj kompanio progresas aŭ regresas. Ne ekzistas horizontala flugo.

Ĉi kampanjo okazu kadre de pli vasta strategio, kio inkluzivu ekzemple, ke landaj asocioj konigu la reklamojn al iliaj landaj asocioj kaj al EU-parlamentanoj, varbado de kursanoj aŭ aliaj agadoj laŭ la landaj kondiĉoj. Ankaŭ tio altiros la amaskomunikilojn kaj Esperantujo vigliĝos.

Mia unua reklamo kostis pli ol EUR 70.000 kaj la prezo trioniĝis kondiĉe al 10-foja ripeto. La nuna UEA-havaĵo larĝe sufiĉas por tio. Kion la Esperantistaro opinias?

Mi dankas al Seán Ó Riain, Renato Corsetti, la estroj de Landaj Asocioj kaj tradukistoj pro la valora kaj sindona apogo dum nia febra kontaktado.

Majstro Hidemaru Deguĉi, kiu sugestis en 1923 adopti Esperanton al Majstro Onisaburo Deguĉi, diris: Homoj ĝenerale alkroĉitaj al la nuno, forgesas la pasintecon kaj ignoras la estontecon. Ni, do, kuraĝe agadu por ke 'la nepoj nin benu'.

Etsuo Miyoshi

Ĉu vi estas legemulo?

Se jes, certe vi ne bezonas legi la jenon,
ĉar veraj legemuloj estas libro-dependuloj.

TAMEN BEDAŬRINDE

mi havas la impreson, ke mankas al la nuntempa mondo
tiaj maniuloj sendanĝeraj.

Facile estas la distrado kaj la informado pere de filmoj, komputiloj kaj aliaj maskomunikiloj, kaj oni emas forgesi la avantaĝojn de libroj. Domaĝe estas, ne nur por la kompatindaj verkistoj kaj eldonistoj, sed ankaŭ por la kompatinduloj, kiuj ne konscias pri la grandaj plezuroj, kiuj atendas ilin eklegonte librojn.

Nia samideano Hori Jasuo el Japanio invitas al ni partopreni en Esperanto-sumoo.

Ne maltrankviliĝu! Tio ne temas pri korpa luktado minimuma.

Oni elektas libron legotan.

Oni mem decidas kiom da paĝoj legotaj dum 15-o da tagoj.

Se oni legos la kvoton oni gajnos, se ne oni malgajnos.

Gajnantoj ricevos diplomojn.

Do jen io por ĉiuj, ĉar oni decidos la legad-kvanton kaj la nivelon de la teksto.

Dum la marta sumoo, du danaj esperantistoj partoprenis la konkurson. Ne,

mi ne estis unu el la diligentuloj, tamen en majo mi sumoos legante la novelaron 'La Verda Raketo' de Jean Forge; mi promesis, ke mi legu 10 paĝojn tage.

Ĉu mankas al vi libro? Ne problemas, ĉar libroj prunteblas en la kulturdomo. Se tie vi ne trovos legindan libron, aliaj aĉeteblas ĉe Arne Casper en la libro-servo, aŭ rete legeblas elektronikaj libroj, pri kiuj mi malpardoneme ravas!

Jen citaĵo de la invitilo de Hori Jasuo.

“1. Celoj

- 1) Altigi legkapablon de esperantistoj.
- 2) Kutimigi esperantistojn legi libron kun ĝojo.

2. Luktmaniero

- 1) Elektu libron, kiun vi legos dum tiu konkurso.
- 2) Decidu kiom da paĝoj vi legos por unu tago laŭ via kapablo.
- 3) Laŭ la irado de vera Sumoo-konkurso, ni luktadas. Se vi legas pli ol promesitaj paĝoj en tiu tago, vi akiros venkon, se ne malvenkon. Tiamaniere vi luktas kun la libro dum 15 tagoj. Vi ne luktas kontraŭ aliaj luktistoj, sed kontraŭ vi mem.

3. Aliĝo:

Sendu jenajn informojn al HORI Jasuo: huri-zonto@water.sannet.ne.jp

- 1) Via nomo, sekso, lando, urbo, retadreso, via luktista nomo.
- 2) Titolo de la libro, kiun vi legos, kaj kiom da paĝoj vi legos.

4. Raportu vian rezulton :

Kiam komenciĝos la Sumoo, ĉiun duan aŭ trian tagon (ne nepre) raportu al la prizorgantoj pri via venko aŭ malvenko. Tiuj notos ĝin kaj resendos al vi la raportaron kun rezultoj de aliaj luktistoj.

5. Diplomo

Kiam venos la Sumoo, vi ricevos diplomon."

Detalaj informoj pri la sumoo legeblas ĉi tie:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html> .

Cetere, laŭ tiu hejmpaĝo ni estas kvar **luktist-IN-oj** el Danio. Nu, ankaŭ **mal-IN-oj** rajtas partopreni.

Hieraŭ mi aŭdis onidirojn pri svedaj luktistoj, kiuj intencos defii nin per vigla sumoado. Do karaj gesamlandanoj, bonvolu elekti taŭgajn librojn kaj apogu la landan agadon.

Betty Chatterjee

Esperanto plej lerninda

La brita revuo The Economist aperigis retan enketan esploron per sia reta paĝaro Intelligent life.com, kiu fremdlingvo estas la plej utila por britoj. Post kelkmonata enketado la fina rezulto estis tre surpriza por ili:

“La respondo al nia reta voĉdonado estis senprecedenca. Kiam la balotado estis fermita, pli ol 11.000 voĉdonoj estis transdonitaj. La ĉefa surprizo estis, ke la unuan pozicion gajnis kun 26% de la voĉdonoj Esperanto – lingvo internacia en kiu homoj de ĉiuj landoj povas konversacii egalrajte. En la dua loko estis brazila portugala kun 16%, tiam la hispana kaj la franca kun 14%, sekvis la ĉina (12%), la latina (5%), la gaela (4%) kaj la araba (2%). Aliaj legantoj sugestis plurajn lingvojn inter kiuj la fikcia (Elfo)”.

Vidu ĉe:

<http://moreintelligentlife.com/blog/georgiagrimond/best-language-poll>

Francisco Javier Moleon [Eŭropa Bulteno]

125 ĉie!



Ĉie en la mondo esperantistoj uzas sian fantazion por rimarkigi la “kvaronan jubileon” de Esperanto. Jen kelkaj poŝtmarkoj (supre) kaj glumarkoj (malsupre) faritaj de s-ro MAEKAWA Haruya en la urbo Nisinomiya, Japanio.

